# *Kubo rememoras la 150-an datrevenon de la ekzekuto de ok medicinaj studentoj*



**Foto: Prensa Latina.**

Havano, nov 27  (RHC) La prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, mar?is hodia? kun miloj da studentoj por rememori la 150-an datrevenon de la ekzekuto de ok medicinaj studentoj, unu el la plej malbonaj krimoj en la nacia historio.

Post eta memoriga ago, la partoprenantoj pilgrimis de la emblema ?tuparo de la Universitato de Havano al la monumento, kiu memoras la studentojn maljuste pafitaj en 1871 de la hispanaj koloniistoj.

En la pilgrimo  anka? estis aliaj ?efaj registaraj figuroj, la Komunista Partio, la Unio de Junaj Komunistoj de Kubo -UJC-, la Federacio de Universitataj Studentoj -FEU-, reprezentantoj de amasaj organiza?oj kaj civila socio.

Parolante al la informagentejo Prensa Latina, la unua sekretariino de la UJC, Aylin Álvarez, emfazis, ke tiu fakto markas kuban kaj universitatan junularon.

"Tial ni mar?as ?i tie en la nomo de la tuta Kubo, krom la agadoj kiuj okazas en aliaj provincoj", diris la aktivulino.

La nacia vicprezidanto de la FEU, Daniel Madina Fernández, diris al Prensa Latina, ke junuloj estas en konstanta debato por defendi la historion.

"Post tiel longe sen povi kunveni tiel, estas tre signifa okazigi ?i tiun tributan mar?on kaj anka? defendi la grandan laboron de la Revolucio," li diris.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/278347-kubo-rememoras-la-150-an-datrevenon-de-la-ekzekuto-de-ok-medicinaj-studentoj

**Radio Habana Cuba**